

Thomas Moore,  
La lasta rozo de somero

*tradukita de N. N. 101*

Nun floras de l'somero la sola lasta rozo.  
La kunvivantoj ĝiaj velkis en mortripozo:  
ne estas flor' parenca, aŭ rozburgono ia,  
Por ĝemojn kaj ruĝiĝojn redoni al alia.

Mi ne vin lasos sole, sur la tronket' plendeti  
Ĉar la beluloj dormas, vi devas kundormeti.  
En morto, sen parfumo, l'amikoj jam dormetas:  
Do floron vian teren ĝentile mi disjetas.

Mi tiel volus sekvi se l'amikec' finiĝus  
Aŭ la juveloj brilaj de l'amular' foriĝus:  
Ĉar se la koroj veraĵ kaj dolĉaĵ ne plu estus,  
En la dezerta mondo volonte kiu restus?

*Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose of Summer" de THOMAS MOORE (\*1779-05-28 - †1852-02-25) en Esperanton de N. N. 101.*

*Arg-530-2211 (2014-11-03 22:41:14)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en <http://www.gutenberg.org/files/38240/38240-h/vol1/e01.htm>.*

Thomas Moore,  
La lasta rozo

*tradukita de Antoni Grabowski*

Jen floras sola, forlasita la lasta rozo de l' somero,  
Dum ĝia ĉarma gefrataro, velkinte kuŝas jam sur tero.  
Ne estas ia flor' parenca, nek roz-burgono en proksimo,  
Por interŝanĝi la ridetojn aŭ la sopirojn, laŭ kutimo.

Mi vin ne lasos, ho soleca, ĉagrene sur trunketo brili;  
Ĉar la karuloj viaj dormas, do iru, dormu vi kun ili!  
Foliojn viajn mi afable disjetas sur bedeto jena:  
Vi kuŝu apud senaroma, malviva kunular' ĝardena!

Mi tiel sekvu, kiam pasos de l' amikeco flor' fidela,  
Kaj el brilanta amo-ringo elfalos lasta ŝton' juvela.  
Ĉar kiam velkis veraĵ koroj, sentemaj flugis for el rondo,  
Ho, kiu volus tiam loĝi solece en malvarma mondo?

*Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose of Summer" de THOMAS MOORE (\*1779-05-28 - †1852-02-25) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (\*1857-06-11 - †1921-07-04).*

*Arg-530-1056 (2010-03-28 19:37:25)*

*Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, kopiis el la retejo <http://www.netlibrary.net/eBooks/Wordtheque/eo/221211.TXT>.*